# *Kuba ministro pri eksteraj aferoj komencas oficialan viziton al ?inio*




**Foto: Minrex**

Havano, jun 5 (RHK) La membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo kaj ministro pri eksteraj aferoj, Bruno Rodríguez Parrilla, estas en la ?ina Popola Respubliko por plenumi oficialan viziton, kiu okazos de hodia? ?is la 9-a de junio.

Dum sia restado, kaj kadre de la agadprogramo, la kuba diplomato faros oficialajn interparolojn kun gvidantoj kaj altrangaj oficistoj de tiu lando.

La kuba delegacio anka? konsistas el la ?enerala direktoro de Duflankaj Aferoj de la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj, Carlos Miguel Pereira Hernández; la direktoro de Azio kaj Oceanio, Ariel Lorenzo Rodríguez, kaj la ambasadoro al la azia nacio, Alberto Blanco Silva.

Fonto: Granma

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/356542-kuba-ministro-pri-eksteraj-aferoj-komencas-oficialan-viziton-al-cinio

**Radio Habana Cuba**